
# Etecsa kaj franca firmao deplojos submaran kablon inter Martiniko kaj Cienfuegos




Havano, dec 7 (RHK) La Kuba Telekomunika Kompanio SA (Etecsa) raportis ?i-merkredon, ke ?i subskribis interkonsenton kun la franca kompanio Orange SA por pligrandigi kaj diversigi siajn internaciajn kapablojn per la disfaldi?o de optika fibro-submara kablo inter Martiniko kaj la provinco de Cienfuegos centrosude de Kubo.

La celo de la submara kablosistemo estas apogi la internacian vasti?on de ETECSA spite al kreskanta postulo je retkonekto kaj lar?bando.

?i estos deplojita fare de Orange Marine, filio de Orange.

La fizika strukturo de la submara kablo estos preta en 2023 kaj donos al la lando novan itineron por internaciaj servoj, kiuj geografie diversigos la nunan konekteblecon.

La starigo de la kablo permesos –la? la ekonomiaj eblecoj de la lando– plu  vastigi internacian konekteblecon.

La projekto estas sub evoluo kaj ?iuj permesiloj por ?ia deplojo estis donitaj.

Fonto: Etecsa

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/307294-etecsa-kaj-franca-firmao-deplojos-submaran-kablon-inter-martiniko-kaj-cienfuegos

**Radio Habana Cuba**